

FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten in der Stiftung Bahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Oktabro / Decembro 1998



En la 42. Jarkunveno. Bodo Ehrlich fakprelegis



Tenoro Fluck prezentis popularajn kantojn en Esperanto

Fotoj: Walter Ullmann

42 jarkunveno de GEFA

De post 1957 Germana Esperanta Fervojista Asocio en la fondaĵo BSW (GEFA) aranĝas seninterrompe sian tradician jarkunvenon. Kutime en aŭtuno kaj alterne en alia urbo. Tiujare inter la 9a kaj 11a de oktobro, venis preskaŭ 70 membroj kaj geamikoj, ankaŭ el eksterlando, al la romantika urbeto Linz ĉe la Rejn-riverego. Malgraŭ nestabila vetero valoris malkovri dum promenado vidindaĵojn el la mezepoka periodo. Faktrabaj domoj, unu pli bela ol la alia, altiris la atenton. Defendopovaj turoj, restaĵoj el la iama remparo, memorigis pri pasintaj, ofte militaj tempoj. Sur la proksima riverego la trafiko de pasaĝer- kaj kargoŝipoj ne ĉesis.

Dum la laborkunsido GEFA-estraro traktis kun la distriktkomisiitoj pasintajn aranĝojn kaj venontajn taskojn. GEFA-prezidanto Joachim Gießner atentigis kun granda zorgo pri la malfavora situacio de la asocio. Varbkampanjojn atingis apenaŭ junajn gekolegojn de post la privatigo de la fervojo. La nuntempa membraro estas maljuna, posteuloj mankas. Tamen ekzistas ankaŭ pozitivaj informoj. Kiel rezulto de la kunlaboro kun la Internacia Fervojunio (UIC) aperis fervojfaka terminaro de 434 paĝoj. En la germanlingva informilo „Unser BSW“, aperanta kvarmonate, aperas regule artikoloj pri GEFA-agado. Destinata estas ankaŭ la kunventago de emerituloj: 22.04.1999 en Fulda. La 43a jarkunveno de GEFA disvolviĝos en Mühlheim (Ruhr) de 8a ĝis la 10a de oktobro 1999. Ĝian organizon transprenos la komisiito por la BSW-distrikto Essen.

Kulmino de tiu semajnfino estis la festvespero. Otto Smits bonvenigis la ĉeestantojn nome de la Fervoja Socialorganizaĵo distrikto Köln. Li kuraĝigis la GEFA-anojn daŭrigi ilian laboron, trarompĵi lingvajn barilojn per Esperanto. Ne ekzistas kaŭzo por rezigni. BSW plie subtenos fervojistajn esperantistojn. Erhard Herlitze, organizanto de la jarkunveno, ricevis apartan laŭdon pro siaj aktivaĵoj. Sekvis salutoj de eksterlandaj gastoj: Johann Geroldinger (Aŭstrio), IFEF-estrarano Henning Hauge (Danio), Henri Grosjean (Belgio) kaj Emil Tudorache (Rumanio). La brila tenoro Ludwig Fluck prezentis verve konatajn kantojn. La agrabla dancmuziko de la Duopo Belsono stimulis resti ĝis noktomezo.

Ke Linz ankaŭ apartenas al la vinregiono laŭlonge de la Rejno, scipovis ĉarme demonstri Sylke Kuhlemann. Mirigajn detalojn pri produktado de alkoholaĵoj oni aŭdis, dum servistinoj enverŝis diverskvalitajn vinojn. Ne povis manki ekskurso. Aŭtobuso transportis la ekskursantojn al la montaro Eifel. Tie, apud grandega, ronda lago, situas fama benediktina monaĥejo Maria Laach. Per filmo la monaĥoj prezentis sian vivon kaj laboron. Neforgesebla estis la vizito de la abateja, romanstila preĝejo kun ĝiaj du turoj. Dimanĉmatene kolektiĝis la kunvenintoj por ĝui ankoraŭfoje la tenoron Fluck

prezentantan popularajn kantojn. Bodo Ehrlich informis per speciala projekciilo pri preparlaboroj de la fervojo por la mondekspozicio 2000 en Hannover. GEFA-prezidanto Gießner vekis per diaprelego memorojn pri 50 jaroj de IFEF-kongresoj. Analizante la nuntempan staton de GEFA oni venas al la prognozo, kian formulis konata politikisto jam antaŭ jardekoj: „La situacio estas serioza, sed ne senespera“.

W.B.

Grüßwort des BSW - Hauptvorstandes

An die Teilnehmer der 42. Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten in der Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW).

Sehr geehrte Damen und Herren!

Liebe Esperanto-Freunde!

Zur Jahresversammlung 1998 übermittelt Ihnen der Hauptvorstand der Stiftung Bahn-Sozialwerk herzliche Grüße.

Traditionsgemäß finden Sie sich zusammen, um gemeinsam erbrachte Leistungen auszuwerten, neue Ziele abzustecken und bestehende freundschaftliche Verbindungen zu festigen.

Auch im vergangenen Jahre konnten durch Ihre Initiativen verschiedene Veranstaltungen durchgeführt werden oder Sie nahmen an ausgewählten Maßnahmen im nationalen oder internationalen Maßstab teil, wobei der internationalen Sprache Esperanto besondere Beachtung zukam.

Damit wurde gleichzeitig ein Beitrag geleistet, die Aufgabenstellungen unserer Stiftung öffentlichkeitswirksam zu unterstützen und auf unsere sozialen Vorhaben aufmerksam zu machen.

Im Rahmen der Tätigkeit unserer verschiedenen Freizeitbereiche sind Sie um eine stete Erweiterung Ihres Wirkungsfeldes bemüht, was unter den zeitgemäßen Umständen aus einer schwierigen Position heraus erfolgen muß.

Dennoch haben Sie auch innerhalb des internationalen Kultur- und Freizeitverbandes der Eisenbahner (FISAIC) Anerkennung und Ausstrahlung gefunden, und das bezieht sich auch auf Ihre Mitarbeit in weiteren fachlichen Institutionen.

Der Hauptvorstand ist überzeugt, daß Sie weitere Anstrengungen zur Durchsetzung Ihrer Vorhaben unternehmen werden und dankt Ihnen für all Ihre Bemühungen und Leistungen mit der Zusicherung weiterer Unterstützung.

Besonderen Dank richten wir an die Funktionsträger und die sie unterstützenden Familienangehörigen. - Wir wünschen der 42. Jahresversammlung einen erfolgreichen Verlauf und für Ihre weitere Tätigkeit alles Gute!

Mit freundlichen Grüßen,

Dietmar Petzold.

Jarraporto 1998

pri la periodo de la 41a ĝis la 42a jarkunvenoj (Aschaffenburg - Linz/Rh)
 [ni rekomendas relegi kun tiu raporto FE 4/97 kaj 1-3/98]

Enkonduko

La rilatoj inter la „Fondaĵo Fervoja Sociala Organizo“ (Stiftung Bahn-Sozialwerk) kaj GEFA, pri kies favora evoluo ni raportis pasintjare, daŭris en sama senco. Ĉiuj kulturaj libertempaj grupoj trovis sian lokon en la multvaria komplekso de BSW. La gvidinstancoj interesiĝas pri nia agado kaj atente sekvas ĝin. Kontraste al tiu pozitiva flanko la negativaj konsekvencoj el la privatigo de la fervojo bedaŭrinde ankaŭ daŭras, eĉ plifortiĝas, tiel ke la ĝenerala situacio de nia asocio meritas nur la atribuon „en danĝero“.

Ni funebras pri

Helmut Ruhl	(84)	13.11.97
Ignaz Panhenrich	(82)	12.02.98
Johann Riedl	(61)	19.02.98
Alfred Conzeth	(85)	im Mai 98
Hans Scherbel	(82)	12.06.98

Ili trovu eternan pacon!

Rondaj naskiĝtagoj kaj festoj

Dieter Hartig	(70)	13.11.97
Otto Rösemann	(75)	18.05.98
Klaus Böhnke	(65)	25.05.98
Alois Hauptenthal	(80)	27.07.98

Irene / Joachim Giessner, diamanta edziĝfestoj 11.06.98

Denove korajn gratulojn kaj bondezirojn flanke de GEFA.



1. Internaj aferoj

1.1. Membronombro

Al BSW-ĉefestraro estis anoncigitaj 244 (271) membroj.

1.2. Kursoj

Ne okazis memstaraj kursoj de GEFA, sed ni partoprenis en lingvokursoj de aliaj organizoj en la distriktoj Frankfurt kaj Münster. La intereso por la telekurso fariĝis magra, kvankam ni menciis ĝin en kelkaj publikigaĵoj.

1.3. Funkciuloj

La komisiito por la distrikto München, Klemens Lenz, devis ĉesi sian funkcion pro sia sanstato. Ĉar la membronombro en tiu distrikto estas malalta, ĝi nun ekzistas laŭ interkonsento kun la distriktestraro sen komisiito. La distribuadon de la revuoj prizorgas Alfred Gissibl.

2. Kunlaboro kun IFEF

2.1. IFK Aalborg

La jubilea 50a IFEF-Kongreso okazis 16. - 22. 5. 98 en la norda dana urbo Aalborg. Bedaŭrinde partoprenis nur 7 germanoj. Kiel kutime ĝi enhavis ampleksan fakan parton, belajn instruajn ekskursojn kaj kulturalan programon. La prezidanto de GEFA kontribuis al la programo per diaprelego pri preskaŭ ĉiuj ĝisnunaj IFEF-kongresoj. Bodo Ehrlich prelegis sukcese pri la fervojaj aranĝoj por la mondekspozicio „Hannover 2000“.

Estis elektita nova estraro (Bolognesi, IT, Gulyas, HU, Quietenski, AT, Hauge, DK, Ripoché, FR, kiel ĉefkomitatano Tomišek, CZ, anstatauintino Feifičova, SK).

2.2. faka laboro

Niaj membroj d-ro Hoffmann agas en la Faka Komisiono kiel sekretario kaj Hartig kiel redaktoro TeKu. Bv. legi la raporton en IF n-ro 6/98.

3. Kunlaboro kun BSW

Vidu sub „Enkonduko“.

4. Aranĝoj, kontaktoj

La 41a jarkunveno okazis de la 10a ĝis la 12a de oktobro 1997 en Aschaffenburg (FE 4/97) kun 64 personoj, inter ili gastoj el Belgio, Danio, Svisio kaj Rumanio. GEFA-membroj krome vizitis aliajn naciajn kaj internaciajn aranĝojn, i.a. UK Montpellier, GEA-kongreson Dresden (tie faka prelego), francan kaj rumanan jarkunvenojn kaj la IFEF-skisemanjon.

5. Informado, varbado

5.1. Fervoja Esperantisto

Ĝi aperis kun 32 paĝoj, 4 bildoj kaj 5 desegnaĵoj. Krome ĝi enhavis la aliĝilojn por la 42a jarkunveno.

5.2. Publikigaĵoj

Ili montras ĝojigan kreskon, ĉefe pro artikoloj, kiuj aperis en „Unser BSW“ danke al la celtrafa laboro de nia „Redakta Stabo“ kaj oftaj instigoj flanke de la redaktoro. Entute ni konstatis 64 [41] artikolojn, kiuj informis pri la agado de GEFA.

5.3. Informiloj, ekspozicioj

El nia stoko denove estis distribuita granda kvanto da informiloj, kvankam sen videbla rezulto. En la distriktoj Frankfurt kaj Stuttgart okazis ekspozicioj.

6. Emerituloj

La emerituloj kun familianoj renkontiĝis la 23an de aprilo en Magdeburg. Partoprenis 31 personoj. Preparis kaj gvidis Rolf Terjung. Li donis historian

superrigardon pri la urbo. Post la tagmanĝo sekvis tre interesa rondirado tra la urbo sub lerta gvidado de anoj de la loka Esperanto-societo. Ankaŭ ĉijare BSW subtenis tiun kunvenon, por kio ni dankas.

7. Perspektivo

La membronombro daŭre montras negativan tendencon. Malgraŭ ĉiuj klopodoj de unuopuloj ne eblis trovi novajn adeptojn. La ĉiutagaj zorgoj de la junaj fervojistoj kaj la dissplitigo de la iam unueca fervojo en dekoj da entreprenoj ne plu ebligas trovi junajn dungitojn. Tiu situacio preskaŭ ne plu lasas ekkoni ŝancon por plibonigo. Kaj tamen: Al ni restos nenio alia ol daŭre streĉi niajn fortojn, daŭre serĉi interesitojn kaj fari el ili novajn membrojn. Bone povas helpi la nova broŝuro de BSW „Da mach´ ich mit“, kiu estas havebla en la t.n. Betreuungsstellen kaj ĉe la BSW-distriktestraroj.

HELPU SAVI NIAN ASOCION

Gießner prezidanto

Kuzbericht Linz 98 (Arbeitssitzung)

Zunächst möchte ich unterstreichen, daß die Zusammenarbeit zwischen der Stiftung BSW und den Freizeitgruppen sehr fruchtbar ist. Das betrifft besonders die Information von oben nach unten, und daß regelmäßige Arbeitstreffen des HV mit den Hauptbeauftragten abgehalten werden.

Hierher gehört auch die gerade erschienene Broschüre „Da mach´ ich mit“, in der die Tätigkeit der Freizeitgruppen beschrieben ist, also auch unsere. Diese Broschüre ist bei den Bezirksvorständen erhältlich und liegt offenbar auch in den Betreuungsstellen aus. Sie ist sehr aussagekräftig und kann gleichzeitig auch in der Werbung für das BSW eingesetzt werden.

Die Tätigkeit des Redaktionsstabes und einiger Bba hat dazu geführt, daß die Zahl der Veröffentlichungen in „Unser BSW“ merklich angestiegen ist. Allen Beteiligten gebührt Dank, auch Dieter Hartig, der stets für die schnelle Weiterleitung aller Nachrichten sorgt.

Gießner

Ŝanĝota nomo de GEFA

Laŭ decido de la laborkonsilantaro kaj la distriktkomisiitoj kaj kun konsento de la ĉefestraro la germanlingva nomo de nia asocio ekde 1. 1. 1999 estos jene ŝanĝota:

Deutsche Eisenbahner - Esperanto - Vereinigung


GEFA



ORG-BSW

Stiftung
Bahn-Sozialwerk 

Struktur der Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW)



WARNUNG

Reisen mit ATCTOURISTIC

Seit einiger Zeit tritt in Eisenbahnerkreisen die Firma „ATC-Reisen GmbH in 32827 Augustdorf“ auf. Sie firmiert auch unter dem Namen „Welcome Tours GmbH“. Es handelt sich hierbei um eine Firma, die mit der ATCTOURISTIC im BSW in keiner Weise etwas zu tun hat. Sie hat jedoch bereits BSW-Spender bzw. ATCTOURISTIC-Kunden irregeführt. Qualität und Sicherheitsstandard der eingesetzten Busse sind unzureichend.

Fest steht: BSW- Spender reisen mit unserer ATCTOURISTIC im BSW; diese hat ihren Sitz in Augsburg.

Hier noch ein Beitrag zur Jahresversammlung

Das BSW heute

Auszug aus einem Vortrag des Vorsitzenden des Hauptvorstandes der Stiftung Bahn-Sozialwerk, Herrn Dr. Sattler, vor Führungskräften der Bahn AG.

Dieser Vortrag enthält zahlreiche wissenswerte Hinweise für die Spender des BSW, also auch für uns, und macht in gut verständlicher Form mit der veränderten Situation bekannt.

Zum 1.1.1997 wurden die beiden Sozialwerke Ost und West zusammengeschlossen und aus der Struktur einer Behörde in die private Rechtsform Stiftung Bahn-Sozialwerk überführt, also eine juristische Person des bürgerlichen Rechts.

Bei einer Stiftung stellt der Stifter, das ist für das BSW der Präsident des Bundeseisenbahnvermögens (BEV), der Stiftung ein Vermögen zur Verfügung, um damit einen bestimmten Zweck zu erfüllen. Daß dies sachgerecht geschieht, darüber wacht die Stiftungsaufsicht als staatliche Aufsichtsbehörde. Die Stiftung hat ihren Sitz in Frankfurt am Main. Daher ist der Regierungspräsident Darmstadt die Aufsichtsbehörde. Dahin ist jedes Jahr ein Bericht über die Erfüllung des Stiftungszwecks einzureichen.

Der Schwerpunkt der Tätigkeit der Stiftung betrifft die aktiven Mitarbeiter der Bahn, also die Jugendlichen, Auszubildenden, die Männer und Frauen, die für den Konzern und das BEV tätig sind.

Weiter übernimmt das BSW verantwortlich bestimmte Aufgaben, die es selbst organisiert, aber auch selbst finanziert, z.B. Gesundheits- und Familienfürsorge, Hilfe in Krankheitsfällen, Förderung kultureller Betätigung in den Freizeitgruppen und internationaler Begegnungen, Betreuung ehemaliger Mitarbeiter und deren Hinterbliebenen. Dazu kommen die Unterstützung des Eisenbahn - Waisenorts und noch einige weitere soziale Aufgaben.

Das Stiftungsvermögen setzt sich - grob gesehen - aus drei Teilen zusammen, nämlich dem Grundvermögen, Finanzvermögen und Fördermitteln. So sind alle Grundstücke, die das BSW bisher für seine Erholungseinrichtungen nutzte, ins Eigentum der Stiftung übertragen worden, etwa 600 000 m².

Das Finanzvermögen aller BSW-Stellen ist 1997 auf die Stiftung übertragen worden. Hierzu kommen jährlich etwa 20 Mio DM an Spenden von rund 500 000 Spendern. Theoretisch könnten rund 860 000 Personen von der Bahn AG, dem BEV und Ruheständler Spender sein. Es ist deshalb auch allgemein eine Daueraufgabe, Menschen als Mitglied für die Stiftung zu gewinnen.

Die Fördermittel sind zum Teil indirektes Vermögen. Es kommt zum Tragen durch die sogenannten Fördervereinbarungen, nach denen das BSW in jeder Hinsicht, vor allem personell und materiell zu unterstützen ist, z.B. in Form unbarer Sachleistungen, aber auch von Barzuschüssen, oder auch, indem die Bahn AG Räume zur Verfügung stellt.

Das Geschäftsjahr 1997, das erste der Stiftung, hat mit einem ausgeglichenen Ergebnis abgeschlossen. Bei einer Bilanzsumme von 205 Mio DM beträgt das Stiftungskapital 41,5 Mio DM. Dieses darf nicht angetastet werden.

Stiftungsorgane

Der Hauptvorstand stellt die ordnungsgemäße Geschäftsführung sicher. Dies geschieht durch allgemein verbindliche „Richtlinien“. Der HV vertritt die Stiftung gerichtlich und außergerichtlich. Er ist auch Arbeitgeber für rund 1400 Beschäftigte. Davon sind etwa 660 hauptamtliche, der Rest nebenamtliche Mitarbeiter. Der HV entscheidet, welche Arbeitsplätze einzurichten und wie sie zu besetzen sind. Das BSW beschäftigt aber auch etwa 20 000 ehrenamtlich Tätige, davon in den Freizeitgruppen 13 Hauptbeauftragte und etwa 160 Bezirksbeauftragte.

Der Aufsichtsrat ist das oberste Organ der Stiftung. Er hat 24 Mitglieder und ist paritätisch besetzt. Er setzt sich zu gleichen Teilen zusammen aus Mitgliedern der DB AG und des Gesamtbetriebsrates sowie des BEV und des Hauptpersonalrats. Auf Bezirksebene (15 Bezirke analog den ehem. Direktionen) bestehen Bezirksvorstände mit regionalen Befugnissen. Sie sind ebenfalls paritätisch besetzt. Ihnen zur Seite stehen Bezirksausschüsse.

Geschäftsfelder

1. Erholungseinrichtungen. Sie sind der größte Produktbereich der Stiftung mit 33 Mio DM Umsatz. Sie sollen keine Zuschußberiebe sein, müssen aber auch keinen Gewinn abwerfen. Die Sozialverträglichkeit muß im Vordergrund stehen. Die Preise haben sich am Geldbeutel der Spender zu orientieren. Die Häuser sind jetzt direkt dem Hauptvorstand unterstellt, so

daß eine einheitliche Wirtschaftspolitik betrieben werden kann. Ein zentrales Reservierungssystem wird noch aufgebaut, um möglichst eine ganzjährige Vollauslastung zu erreichen. Der Qualitätszustand der Häuser ist zufriedenstellend, wird aber noch allgemein auf einen Standard gebracht, den der Gast auch anderswo im Urlaub gewohnt ist.

2. Kultur und Freizeit

In 1228 Gruppen sind etwa 48 000 Menschen engagiert, die dort ihren Neigungen nachgehen. Es bestehen laut Geschäftsbericht 1997 13 wichtigere Freizeiparten, darunter Esperanto, und Dutzende kleinerer Gruppen.

Auf internationaler Ebene gehört die Stiftung BSW als deutscher Landesverband der FISAIC an, dem Internationalen Kultur- und Freizeitverband der Eisenbahner, der in 24 Landesverbänden über 100000 Mitglieder zählt.

Dr. Sattler formuliert zum Schluß: „Die Stiftung BSW ist die soziale Klammer für alle Eisenbahner, Aktive, Jugendliche, aber auch für die Ruheständler, für den DB-Konzern und für die Verwaltungsstellen des Bundes-eisenbahnvermögens.“

Zusammengestellt: J. Gießner HB Esperanto

Anschließendes Schlußwort des Hauptbeauftragten

Diesem Bericht muß ich noch ein paar Worte über unsere Freizeitgruppe GEFA hinzufügen.

Bald gehen wir wieder auseinander in unseren Alltag. Jeder hat seine persönlichen Sorgen und Freuden. Bitte laßt uns darüber eines nicht vergessen: Unsere Vereinigung, unsere GEFA ist in Gefahr. Die Gründe sind bekannt. Die Bahn, wie sie einst bestand und wo wir unsere Mitglieder fanden, gibt es nicht mehr. Die wenigen jüngeren Eisenbahner haben viele Sorgen, alle anderen sind in Dutzenden von Tochtergesellschaften verstreut. Uns bleibt hauptsächlich die persönliche Initiative im Bekanntenkreis, auf Reisen, in den Ferien und wo auch immer. Und stets sollte man Informationsmaterial bei sich haben, sich Anschriften geben lassen und nachhaken. Infos können bei den Bezirksbeauftragten abgefordert werden.

Machen wir alle mit! Es ist fünf vor zwölf!

Vors. Gießner

Achtung! Überweisungen für den 51. IFEF-Kongreß in Le Mans

Wie schon mehrfach praktiziert, haben wir auch dieses Mal ein Konto eingerichtet, auf das die Kongreßteilnehmer Kongreßbeiträge (siehe Generalaj Instrukcioj) und andere Vorauszahlungen einzahlen können. Dieses Verfahren kann ab sofort genutzt werden und gilt bis 10. 1. 1999. Spätere Geld-eingänge werden kostenpflichtig zurück überwiesen. Wer das Verfahren in Anspruch nehmen will, möge bitte folgendes beachten:

1. Gleichzeitig mit der Überweisung eine aufgeschlüsselte Mitteilung hierzu an den GEFA-Sekretär an folgende Anschrift senden:

Hans-Jürgen Riehn, Karlsbader Str. 89, 08355 Rittersgrün.

2. Den Anmeldevordruck an die darin angegebene Anschrift in Paris schicken mit Angabe, welche Beträge wofür und ggf. für welche anderen Personen auf das GEFA-Sammelkonto überwiesen worden sind.

Das Sammelkonto lautet: 200 664 634 bei Sparda-Bank Karlsruhe, BLZ 660 905 00. Empfänger Hans-Jürgen Riehn für Le Mans.

Nachruf Friedrich Mager

Am 26. 09. 1998 verstarb unser langjähriges Mitglied Frierich Mager.

In der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt bleibt er vor allem in Erinnerung als eifriger Sammler von Briefmarken mit Esperanto - Motiven, wobei er sich oft für die Internationale Sprache Esperanto einsetzte.

Egon Kiefer

40. IFEF - skisemajno

La IFES ĉi-vintre okazos en regiono, kiu estas por germanoj aparte interesa, nome en montaro Riesengebirge, en loko Karpacz, pensiono Halny (Föhn). La bone ekipita pensiono situas je piedo de la plej alta pinto Schneekoppe. En distanco de 500 m troviĝas seĝolifto ĝis la pinto de Schneekoppe, apud la pensiono estas aliaj liftoj. Niaj polaj geamikoj kore invitas al partopreno. Aliĝiloj haveblaj ĉe

J. Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz.

Aus den Gruppen

Bremen Jen menciindaj okazaĵoj en la BSW-grupo Bremen.

Kune kun la loka grupo ni kunvenis en nia kunvenejo „Brodelpott“, kiun ni nomas, memore al la fama pariza grupo en la 20aj jaroj „Bolanta Kaldrono“.

Elstaris la interesa prelego de s-ro Bodo Ehrlich pri la “Mondekspozicio 2000” en Hannover. Ni ja spertas la prelojn eĉ en Bremen per la novaranĝo de la stacidomo kaj alaj trafikinstaladoj.

S-ro Ehrlich raportis pri la konstruo de la stacio Laatzen apud la konata foirejo kaj pri la novaranĝoj. Li montris per speciala projekciilo la novan rapidtrajnon kaj la novajn itinerojn, kiuj devos transporti milionojn da vizitantoj.

Li prezentis sian prelegon kiel fakprelegoj en la IFEF-Kongreso en Aalborg kaj en nia GEFA-Jarkunveno en Linz.

La 9an de septembro ni aranĝis postferian renkontiĝon. Ĉiu povis raporti pri siaj feriaj travivaĵoj (kaj per tio praktiki la internacian lingvon). Ni aŭdis pri la GEFA-Kongreso, al kiu ni kvinope partoprenis, pri aventurvojaĝo al Portugalio kaj Svislando. Sed ankaŭ feriado en Germanio povas esti interesa, kiel ni aŭdis.

La 7an de novembro la bremana BSW-Esperanto-grupo kaj membroj de la grupoj el Bremen, Oldenburgo kaj Unterweser kunvenis en Oldenburg, 65km for de

Bremen. Estas, same kiel multaj el niaj aranĝoj, jam historia, ĉiujara aranĝo. Invitis s-ino Coburger. Ŝi malfermis la kunvenon per ĉarma poemo:

„La lasta rozo“. La vespero estas tre agrabla. Ni manĝetis membakitajn kukojn kun kafo aŭ teo. Poste ni sidis en granda rondo kaj la babilado fluis gaje. Estis jam malfrue, kiam ni kun sincera danko al la gastigantino, hejmenveturis.

La 11an de novembro en nia Bolanta Kaldrono ni aŭdis prelegon pri „Ili ŝanĝis la mondon“. Temas pri prelego pri ekkonoj kaj inventoj de la antikvo ĝis nun, kiuj grave influis la homan vivon..

La 9an de decembro ni festos la Zamenhoffeston en la nova loĝejo de ge-Hartig. Tie estos samtempe la „tabloŝovado“, laŭ la bremena kutimo kunvenas karaj amikoj por komune ŝovi la tablon. Ili kunprenos ĉiujn necesajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn. Post tiu festo la loĝejo estas inaŭgurita.

Hg

Frankfurt

Der älteste Esperanto-Klub der Welt feierte sein 110-jähriges Bestehen

1888 bildete der Weltsprachenverein Nürnberg den ersten Esperanto-Klub der Welt.

Am 24. 10. 1998 feierte nun der Esperanto-Klub sein 110. Gründungsfest mit mehr als 100 Gästen, darunter Sprachfreunde aus aller Welt.

Der Beauftragte für Esperanto, BSW-Bezirk Frankfurt, überbrachte Grüße und Glückwünsche im Namen der deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung (GEFA) und der BSW-Esperanto-Gruppen Frankfurt.

Egon Kiefer


Kristnaskaj bondeziroj

Al ĉiuj legantoj ni deziras

**agrablan adventon kaj
feliĉajn festotagojn kaj
sanon por la venonta jaro.**

La prezidanto alkroĉas sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la bonfarto de GEFA.

Li deziras al ĉiuj kunlaborantoj kaj familianoj belajn adventajn semajnojn, benitajn kristnaskajn festotagojn kaj por 1999 ĉion bonan kaj personan bonfarton.



Por ŝpari afrankon, ni ĉiujare rezignas sendi kristnaskajn saluletetojn al unuopaj personoj.

Redaktado por FE 1/99 estas la 25. 02. 1999

Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main

Schriftleitung / redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen

Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Gustav-Heinemann-Str. 70. 28215 Bremen